

sub la suda kruco ★

# ESPERANTO

**Nova libro kiu mencias Esperanton**

**Pri [Change.org](http://Change.org)**

**Opaloj**

**La Uluna lineo**

**Nordeŭropa Esperantujo**

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj  
volumo 18 [2] • numero 102 • junio 2010  
ISSN 1038-9380



# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIOJ

volumo 18 [2] • numero 102 • junio 2010

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktoroj | Chris Krägeloh & Sándor Monostori

Kontaktadreso | [esk2@esperanto.org.au](mailto:esk2@esperanto.org.au)

P.O. Box 1097

Bendigo Central, Vic 3552, Australia

## Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas aŭtomate sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | [www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au) – [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)

NZEa | [www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz) – [nzea@esperanto.org.nz](mailto:nzea@esperanto.org.nz)

## Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15a de aŭgusto 2010

La redaktoro rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj  
en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.  
Ili ne necese spegulas la opiniojn  
aŭ de AEA, aŭ de NZEA.**

Copyright © 2010, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

# Enhavo



**5** "Ne plu, ne plu!"



**6** Nordeŭropa Esperantujo

**10** Dankesprimoj



**12** La *Uluru* lineo

**14** Pri *Change.org*




**16** Unu tago en Kanbero



**22** Opaloj

**23** Mia sperto kiel  
senlaborulo

**24** Letero al *ESK*



**25** Nova libro kiu  
mencias Esperanton

**26** Nekrologo: Joyce Hill





# Antaŭparolo



*Sex sells*, oni diras en la angla, ĉu ne? Do, jen la kialo de la kovrila bildo de ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco*. Kial ne estu provoka? Kial ne provu gajni la atenton de ne-esperantistoj, kiuj ie vidas ekzempleron de ĉi tiu gazeto? Ĉu Esperanto mem ankaŭ ne estas iom provoka?

Do, ĉu Chris ne havas pli profundan mesaĝon ol simple diri *sex sells* [sekso vendiĝas]? Mi pensu...eble jes...

Se vi estas parto de iu Esperanto-klubo (kaj la plimulto de esperantistoj estas), vi bone konas la ofte faritan demandon: Kiel reklami Esperanton? Ĉu ni prezentu faktojn pri la lingvo (ekzemple la facilecon de ĝia lernado), ĉu ni reklamu la internan ideon de Esperanto, aŭ ĉu ni emfazu ke oni povas vojaĝi facile pere de Esperanto? Certe, ĉiuj el tiuj tri strategioj indas, ĉar diversaj homoj ekinteresiĝas pri Esperanto pro diversaj kialoj. Sed la problemo ofte estas kiel fari la unuan dialogon kun ekinteresiĝontoj. Kiel gajni la atenton de homoj, kiuj nenion scias pri Esperanto?

En la hodiaŭa mondo, kie ni estas bombarditaj de mesaĝoj en la amaskomunikiloj, niaj cerboj devas uzi rigoran filtrilon kontraŭ tiu konstanta prezentado de stimuloj. Pro tio, ni devas pensi pri pli diversaj, novaj, aŭ eĉ laŭtaj manieroj prezenti nian mesaĝon. Gajni la atenton de homoj jam estas malfacile, sed nun ni ankaŭ devas reteni ĝin. Nia mesaĝo devas esti mallonga kaj simpla. Ĉar ni ofte ne havas la lukson de longa kaj forta atento, ni devas uzi multefikan kaj multsensen manieron. Pro tio, krom la mesaĝo mem, oni ankaŭ ofte provas alvoki la emociojn de la ricevonto de la mesaĝo. Ni ĉiuj scias kiel oni ofte reklamas novajn aŭtojn: Oni starigas belulinon kun la aŭto. Laŭ psikologia teorio, kiu informas tiun teknikon, oni asocias la belulinon kun la aŭto, tiel, ke se vi vidas la aŭton sole, via cerbo revivigas la bildon de la belulino.

Tiu nekonscia asocia lernado estas ege efika - eĉ se ni konstatas "Ĝi ne funkcias ĉe mi!". Se ĝi ne funkcias, kial firmaoj tra la mondo elspezas grandegajn sumojn da mono dezajni kaj regultempe re-dezajni iliajn simbolojn [angle: *company logo*]? Eĉ en nia aŭstralazia Esperanto-movado ni havis rilatan debaton antaŭ ne longe: Oni debatis ĉu indus ŝanĝi la nomon de Esperanto al alia, kiel *Monda Lingvo*, aŭ simile.

Do, bonvolu ne zorgi ke via kara gazeto nun fariĝos klaĉa kaj aĉa. Ni certe ne planos raporti pri la vivoj de famuloj, kiel Britney Spears, Brad Pitt aŭ Tiger Woods. Tiu ne estas la intenca signalo de la kovrila bildo. Sed eble tiu provoka kovrilo povos instigi nin konsideri pli varian, novan aŭ provokan manieron reklami Esperanton!

Amike

*Chris Krügeloh*



# Rakonto: "Ne plu, ne plu!"


de David Ryan

Estas bela, trankvila, senbrua tago en Velingtono. La suno, alta en la ĉielo, bruligas la teron kaj ĉiujn en la flavsabla plaĝo. Neniu laboras en ĉi tiu varmega, somera tago. Nur unu malfeliĉulo devas labori hodiaŭ, grimpante la malfacilan monteton per malrapidaj paŝoj por atingi sian laboron kiel purigisto ĉe la studenta domo, ejo de la kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. La marbirdoj en la blua sennuba ĉielo rigardas la kompatindulon. Tamen, ĉi tiu kompatindulo kaptas la atenton de neniu alia. En ĉi tiu januara, sunplena tago ĉiuj lacas kaj aŭ restas hejme trinkante botelon da bongusta nov-zelanda vino aŭ ĉe plaĝo kun glaciaĵo enmane.

Subite, dolorplena krio aŭdiĝas. Kuras je tutrapideco el la kongresejo freneza viro kriante laŭtvoĉe: "Ne plu, ne plu".

Ĉi tiu frenezulo, preterpasante la kompatindan purigiston, frapas kaj puŝas lin teren kaj daŭre kuras eĉ pli rapide rekte al la urbcentro. "Taksio!", li krias, "taksio, portu min tuj al la flughaveno". Por pli rapide kuri, li eĉ forĵetas siajn okulvitrojn, ĉemizon, ŝuojn, kaj pantalonon. "Ne plu, ne plu!", li krias.

Horojn poste, aviadilo alte superflugas la urbon. La sunbruniĝantaj gejunuloj en la plaĝo aspektas kiel etaj insektoj. Bela junulino sin turnas al sia apuda kunpasaĝero kaj demandas al li per afabla voĉo: "Sinjoro, ĉu mi helpu vin? Mi ne komprenas kial vi krias 'ne plu, ne plu'". Johano rigardas la belan junulinon kaj, nun iom pli malstreĉita pro survoja reiro al sia hejmurbo foren de la ejo de la Esperanto-kongreso, respondas: "Lingvaj sesioj pri gramatiko de Esperanto, akuzativo, participoj, prepozicioj - ne plu, ne plu!". ★





# Nordeŭropa Esperantujo

Vojaĝante tra multekostaj landoj pere de Esperanto

de Indrani Baharry Lall

Ĉar Aŭstralio estas tiom for, kiam mi foje ĉeestas UKojn, mi kutime ŝatas pli longe vojaĝi tra la najbaraj landoj.

Post aliĝo al la Bjalistoka UK, mi decidis viziti la landojn en tiu regiono, nome la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro. Temas pri la landoj Estonio, Latvio, Litovio, Pollando, Danio, Svedio, Norvegio, Finnlando kaj Rusio. Krom Rusio kie oni devigis min partopreni ekskurson, mi vojaĝis ĉie alie sole.

Estas konate, ke Skandinavio estas ege multekosta, kaj pro tio mi decidis vojaĝi per Esperanto, uzante la Pasportan Servon kaj la deligitan servon de UEA. Tio brile sukcesis!

Mi flugis de Adelajdo al Helsinki kaj tuj iris al *Jyväskylä* (meze de la finna lago-distrikto). Mi loĝis ĉe Matti Lahtinen. Post kelkaj tagoj de ripozo kaj Esperanto-babilado (sufiĉe serioza) mi reiris al Helsinki. Ĉar estis julio kaj poste aŭgusto kiam multaj esperantistoj mem vojaĝas, mi ne ĉiam povis loĝi ĉe esperantistoj.

Post kelkaj tagoj, de Helsinki mi iris per pramo al *Tallin*, Estonio. Ankaŭ tie mi maltrafis esperantistojn - ili ĉeestis la ĉi-jaran BET kongreson en *Parnu*. Mi vizitis la ampleksan malnovan

Sur ŝipo tra la *Lofoten* insuloj, Norvegio





urbon de *Tallin* dum pluraj tagoj, kaj poste iris al *Parnu* fakte tuj post *BET*. Tie mi renkontiĝis kun Peeter Aitai, je 22:30 sed ankoraŭ taglumis. Mi ĝuis mallongan viziton kun li, kaj la sekvan tagon mi renkontiĝis kun lia filino Diana, denaska esperantistino.

Sekve mi vojaĝis al *Riga*, Latvio, kie mi gastigis ĉe Biruta Rozenfelde. Biruta montris al mi la malnovan urbon, aranĝis Esperanto-kunvenon ĉe si kaj dum la sekva tago du lokaj esperantistoj montris al mi pli de *Riga*. Estis vere plezura Esperanta vizito.

Tiam al Litovio: mallonga vizito al *Klaepeda* por sperti la maron kaj *Nida* kun mirindaj sablodunoj. Poste al *Vilnius* kie mi gastigis ĉe Daina, esperantistino kiu helpis dum la *UK* en *Vilnius* kaj certe multe aktivas en la movado. Mi ankaŭ renkontiĝis, vespermanĝis kaj drinketis kun afabla Irena Alijoshiute.

Poste mi vojaĝis al Varsovio por partopreni la antaŭkongreson. Mi ne raportos pri la Bjalistoka *UK*; aliaj jam faris tion. Mi nur volas diri ke mi omaĝis al nia Ludoviko, vizitante lian tombejon, naskiĝlokon, diversajn statuojn, stratojn kaj novan muzeon dediĉitajn al li.

La lastan tagon de la *UK* mi flugis al Kopenhago, sed mi iom maltrankviliĝis ĉar iu dana esperantistino promesis trovi loĝlokon por mi ĉe alia esperantisto, sed mi tute ne sciis kun kiu. La sama situacio okazis al Atilio Rojas. Ni ambaŭ sidis en la flugĉambro (ni alvenis tien frue) kaj de tempo al tempo scivolis kie kaj kun kiu ni gastigos! Sed fine ĉio estis en ordo, Atilio trovis sian kontakton kaj esperantistino Ana Cumbelic Rossum pretis loĝigi min. Mi estis tre bonŝanca ĉar ŝi montris al mi ĉiajn famajn lokojn de Kopenhago kaj en la cirkaŭaĵo. Mi ne mencios la manĝadon kaj babiladon kiujn ni ĝuis! Ankaŭ iun tagon mi vizitis *Odense* por spekti muzeon kaj teatraĵon de Hans C. Andersen.







Ĉe Zamenhof-statuo en Bjälstoko

Poste per nokta trajno mi vojaĝis al Stokholmo kie mi gastis ĉe Soile Lingman. En la sama tago de mia alveno okazis klubrenkontiĝo en loka Esperanto-domo. Ĝi estas bonega klubejo - se nur en ĉiu urbo ni povus havi tion! Dum la sekvaj tagoj esperantistoj ankaŭ plue montris al mi la urbon.

Sekve al Oslo, Norvegio, kie Heming W. Thorbjornsen gastigis min. Kvankam li ĵus translokiĝis kaj ankoraŭ ne ordigis la apartamenton, li tre afable akceptis min kaj eĉ kuiris por mi (li estis iama profesia kuiristo) - kiel bonŝanca mi estis! Dum la tago mi vizitis la urbon, multajn muzeojn, diversajn parkojn ktp. Ĉie en Skandinavio mi ege ĝuis la arkitekturon kaj majstrajn desegnaĵojn (mi mem preferas tian modernan stilon).

Tiam per la fama vojo tra *Myrdal / Flam* kaj per ŝipo sur *Sojgnefjord* al *Bergen*. Denove mi gastis ĉe esperantista paro Ingebjorg Rambjer kaj Helje Knudsen en ilia domo superrigardante lagon. *Bergen* havas interesan haven-scenaron kaj pitoreskajn domojn surflanke de la multegaj montaroj.

Poste per nokta aŭtobuso al *Trondheim* kie esperantistoj Torstein Kvakland kaj Christiaan Fossen gastigis min en sia bela domo. Ankaŭ tie ili aranĝis Esperantan kunvenon, kvankam mi nur lastmomente decidis vojaĝi al *Trondheim*. Denove ili bonege manĝigis min; eĉ preparis balen-viandon por mi!

La sekvanta celo estis *Tromso* ege norden de la arkta circolo. Por atingi tien mi vojaĝis tra la *Lofoton* insuloj per luksa ŝipo *Hurtigruten*. Estis bela vojaĝo sed bedaŭrinde blovegis/pluvegis (kiel dum preskaŭ mia tuta ferio!).

Mi preskaŭ enbloviĝis *Tromson*, sed kia surprizo vidi sur la kajo knabon (13 jaraĝa) kun afiŝo: "Esperanto - INDRANI"!

Dum la sekvantaj kvin tagoj mi havis nekredible bonan sperton loĝante kun esperantista familio Machlik: Marianne Lund,



Mario, Jun, ĝemeloj Monika kaj Edit (11 jaraĝaj) kaj Edre (9 jaraĝa). Ni vere ĉiam nur parolis Esperanton, ludis Esperantajn ludojn, babilis ktp. Kia bela etoso! Lun tagon ni iris en la montaron por kolekti fungojn kaj mirtelojn, mi ankaŭ ĉeestis koncerton en kiu Mario ludis (li estas violonĉelisto) kaj miris pri la tre flambriila dirigento, neniam mi vidis dirigenton tian!

Mi interesiĝis pri la samea popolo (pli bone konata kiel la laponoj), kaj volis provi viziti ilin en ilia vilaĝo en Norda Norvegio aŭ Norda Finnlando. Sed la tempo de la jaro ne bone taŭgis, kaj al mi ankaŭ ne restis tiom da tempo (mi devis esti en s-ta Peterburgo je certa dato). Sed mi vizitis muzeojn pri ilia kulturo kaj ankaŭ ĉeestis samea festivaleta en *Tromso*. Do tio kontentigis min.

Post malgaja adiaŭo al familio Machlik, mi vojaĝis al *Rovanieme*, Finnlando, kie mi renkontiĝis kun esperantisto Pekka Valimaki kaj ankaŭ tie vizitis ege interesan muzeon *Artikum*. Tiam mallonga vizito al *Kuopio* kie mi spertis fum-saŭnon, kaj fine unu tago en *Lappeenranta* kie mi loĝis ĉe Irja Miettinen, antaŭ ol vojaĝi aŭtobuse al St. Peterburgo.

Mi estis en vojaĝ-grupo (almenaŭ 30 jarojn pli aĝa ol ili). St Peterburgo estas mirinda kultura urbo kun eble tro da preĝejoj, palacoj, muzeoj ktp. Ni ankaŭ vizitis Vladimir, la malnovan ĉefurbon de Rusio, *Susdal* kaj laste - Moskvon! Estis por mi interese vidi ĉiajn (fi-famajn) politikaĵlokojn kaj ankaŭ renkontiĝi kun malnovaj esperantistaj geamikoj tie.

Fina komento: Loĝi ĉe esperantistoj ne nur ŝparas monon, ili multon klarigas pri sia lando, kulturo, politiko ktp., sed samtempe oni interesiĝas pri via lando. Mi ĉiam kunportas bildojn de nia faŭno/floro, ekzemple. Do ni samtempe riĉigas niajn vivojn. Dank' al Esperanto.★





# Dankesprimoj

Hodiaŭ mi ricevis de *UEA* senditan diplomon al Svetislav Kanaĉki por “Elstara Agado” je fondo de Esperanta radio-programo ĉe 3zzz multlingva komunuma radio. Dankegon al ĉiuj kiuj konsideris proponi tiun honoron al *UEA*. Tio vere surprizis min. Dankon al Jennifer Bishop pro sia instigo al la samideanoj subskribi la proponon al *UEA*.

La diplomo havas mian nomon, sed vere, sen la financa subteno de membroj, samideanoj kaj donacoj, unu persono ne povus daŭrigi la agadon tiom longe. Mi devas aparte danki Jennifer Bishop, kiu akceptis mian proponon komenci kunlabori kaj lingve plibonigi la disaŭdigadon kaj administri laŭ necese anglalingve, kiu estis tre grave en la komencaj jaroj.

Multaj komencis sed ne daŭris longe pro diversaj kialoj, kaj ĉesis fizikan helpon ĉe studio mem. Mi mencias nur kelkajn: Johan Macleod kaj Helen kiuj preparis kaj elsendis la unuan programon, Harold Ĉik kiu legis kaj korektis legaĵojn anglalingve, Harold Biĉi kiu skribis kaj pliposte legis unu fojon kaj tuj poste ĉesis.

Dum du jaroj mi estis sola ĉe la radia programo. Feliĉe el Anglio enmigris gesinjoroj Alan kaj Jennifer Bishop. La 5an de oktobro 1992, la Viktoria Esperanto-Federacio havis seminarion, kie mi konatiĝis kun Jennifer kaj menciis pri radioprogramo de Esperanto. Mi proponis al Jennifer kunlabori en la Esperanto-radio, kaj ŝi respondis ke ŝi parolos kun sia edzo, kaj la diplomo estas la rezulto de la senĉesa aktivado de Jennifer, eĉ kiam ŝi havis prisanan problemon.

Intertempe: Pri muziko helpegis Max Wearing. Kun la stoko de esperantaj kantoj kaj intervjuoj de siaj spertoj pri Esperanto tra Eŭropo. Koncerne kantojn, kiujn mi ne havis, mi petis Anna Dogget, muzika instruistino, por helpo. Anna volonte akceptis kaj instruis al siaj studentinoj kvin kantojn.

Poste, el Francujo venis Franciska Toubale, kiu komencis per legado, sekvis panelado, program-preparo kaj nun ŝi estas kunvokanto. Laslo Farkaŝ paneladas, preparas kaj legas. Ken Rolls panelis kaj legis unu fojon kaj tuj poste ĉesis. Tris Raouf legis dum du jaroj, Margaret Inglis legis ĉiam kiam ni havis bezonon. Petro Danzer helpis je sonbendigo. Doroteo Bisouth legas laŭ necese. Karlo Egger legas. Alan Bishop estas tre bonvena inter la skipo ĉe Esperanto radio-programo. Li tre rapide konatiĝis pri ĉio kaj belvoĉe prezentas programon. Ralph Harry prezentis la serion “Aventuro en Esperanto-lando”.

Dankon ankaŭ al Kep Enderby, kiu helpis multe precipe en la komenco, kiam mi batalis kun la estraro de 3zzz, kiu ne volis akcepti Esperanton, ĉar ĝi ne estas lingvo de iu gento. Mi petis de Kep leĝan helpon, kaj li afable kaj rapide sendis argumenton por pruvi ke esperantistoj havas la rajton membriĝi en la radio. Surbaze de tio ni estis akceptitaj samrajte kiel la alilingvanoj.



Miaj dankesprimoj ankaŭ iras al Marcel Leereveld, kiu helpegis multfoje pri gramatikaj reguloj. Peter Ellyard kaj aliaj donis intervjuojn. Mi ne devas forgesi niajn membrojn, aŭskultantojn enlande kaj eksterlande, kiuj helpis per siaj korespondaĵoj, kritikoj, rimarkoj kaj aprezoj. Tiu radio-programo ne travivintus sen membroj, helpantoj kaj aktivuloj kiuj regule ĉiun lundon senescepte iras al la studio por prezenti mempreparitajn programojn.

Dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al nia Esperanto-radioprogramo ekde la komenco ĝis nun, kaj kiuj estonte kontribuos. Dankon. ★

*Svetislav Kanaĉki*

---

Vidu la retpaĝaron de 3zzz ĉe: [www.3zzz.co.au](http://www.3zzz.co.au)

## Nova retadreso por *ESK*!!

Ĉar ni daŭre havis problemojn kun nia interreta servo, ni devis ŝanĝi nian adreson. Ekde nun, vi povas kontakti la redaktorojn de *ESK* per:

[esk2@esperanto.org.au](mailto:esk2@esperanto.org.au)



# La *Uluru* lineo

de Kam Lee

La *Uluru* lineo estas skulptaĵo lokita apud la Nacia Muzeo en Kanbero. La verko konsistas el kelkaj partoj. La unua parto estas grandega rubandaspekta strukturo, kiu unue funkcias kiel tegmento de la muzea piedvojo. La dua parto estas daŭro de la rubandaspekta strukturo, kiu en cirkla vojo leviĝas maksimume 30 m alte, kaj poste malleviĝas al la tero.

La tria parto de la skulptaĵo estas larĝa ruĝa piedvojeteto kiu finfine spiralas internen kaj koncepte iras nordokcidente al *Uluru (Ayers Rock)*. La skulptaĵo esprimas ligon inter la politika kaj la spirita koro de Aŭstralio.

Iun dimanĉon en novembro de la pasinta jaro, Miranda Lutz, Andrew Lutz, Jonathon Moylan kaj mi vizitis la inspiran skulptaĵon. ★



*Maldekstre: En la fono estas la flava arko, kiu griziĝas, malsupreniras kaj poste fariĝas la ruĝa piedvojo de la tria parto de la Uluru lineo.*

*On the left: In the background is the yellow arc, which descends and later becomes the red walkway of the third part of the Uluru Line.*

*Dekstre: Spiralaspekta parto de la Uluru Lineo.*

*On the right: Spiral part of the Uluru Line.*





# The *Uluru* line

by Kam Lee

The Uluru Line is a sculpture located beside the National Museum in Canberra. The work consists of several parts. The first part is a giant ribbon like structure, which functions as a roof of the museum walkway. The second part is a continuation of the ribbon like structure, which in a cyclic path is raised to a maximum height of 30 m and later lowered to the ground.

The third part of the sculpture is a large red walk way, which eventually spirals inwardly and conceptually goes north west to Uluru (Ayers Rock). The sculpture expresses a link between the political and the spiritual heart of Australia.

On a Sunday in November 2009, Miranda Lutz, Andrew Lutz, Jonathon Moylan and I visited the inspirational sculpture. ★

*Dekstre: La spirala strukturo sidas sur monteto.*

*On the right: The spiral structure sits on a hill*



*Maldekstre: Grupa agado sur la ondo de la Uluru Lineo. La kvar homoj estas ligitaj je mano al mano laŭ lineo.*

*On the left: Group activity on the wave of the Uluru Line. The four people are linked hand to hand along a line.*





# Pri *change.org*

Ĉi tiu artikolo estas resumo de la ĝisnunaj du voĉdon-kampanjoj pri la lerneja instruado de Esperanto en Usono, kadre de la organizaĵo *change.org*.

I. La usona organizaĵo *change.org* fondiĝis en 2005 por kolekti kaj - laŭeble - efektivigi ideojn, kiuj povus ŝanĝi la socian, politikan, spiritan kaj ekonomian vivon de Usono. La organizaĵo nun havas proksimume 1,000,000 individuajn kaj grupajn membrojn, ne profitocelajn organizaĵojn. Tuj post la elekto de Barack Obama, kiel prezidento, *change.org* iniciatis grandan voĉdonkampanjon pri la plej bonaj, plej subtenataj ideoj/proponoj (en novembro-decembro de 2008 kaj januaro de 2009). La nova registaro de Obama ricevis la 10 plej subtenatajn proponojn. Inter 7,500 proponoj aperis tiu de Oleg Izyumenko, kiu proponis la enkondukon de la lerneja instruado de Esperanto en Usono, kiel kapabloevoluiĝa lernobjekto. Helpe de la tutmonda esperantistaro, fine la pri-esperanta propono atingis la 25an lokon, kun 3597 voĉoj kaj 931 (grandparte subtenaj) alparoloj. Ekde tiam la organizaĵo *change.org* oficiale subtenas la Universalan Esperanto-Asocion. Bonvolu viziti la retejon <http://www.change.org/nonprofits/view/217204>.

Ni rekomendas aliĝi tie al la subtenantoj de UEA. Oni devas ĉiujare ripeti la subskribon. La 25an de januaro 2009 aperis kadre de *change.org* la bonega promespropono de Renata Ventura [http://education.change.org/actions/view/study\\_esperanto\\_10\\_minutes\\_a\\_day\\_and\\_become\\_a\\_world\\_citizen](http://education.change.org/actions/view/study_esperanto_10_minutes_a_day_and_become_a_world_citizen). Ĝis nun iom pli ol 600 homoj subskribis la promesproponon. Bonvolu subskribi kaj varbi subskribontojn ankaŭ vi! La 15an de decembro 2009 la komenca paĝo de *Google* aperis en 35 landoj kun Esperanta flagego. La tutmonda firmao *Google* rimarkis Esperanton. La saman tagon la ĉefartikolo de *National Geographic* temis pri Zamenhof. Vidu la retejon <http://news.nationalgeographic.com/news/2009/12/091215-ll-zamenhof-google-doodle-esperanto-150th-birthday.html>. Permesu al ni citi - en Esperanta traduko - la lastan alineon de la artikolo de Jonathan Pool: "Zamenhof dirus [ke la disvastiĝinta uzado de la angla lingvo] estas bona rezulto kun malbona lingvo, kaj tial ĝi estas malbone farita. Tio daŭre klasifikas plimulton de la homaro kiel duklasaj civitanoj". Fine de la pasinta jaro komencis kreski la nombro de subskriboj, subtenataj la aperigon de la ĉapelitaj literoj en la sistemo *Android* de *Google*: <http://code.google.com/p/android/issues/detail?id=1730>. Ni kredas, ke ne ekzistas tiaspecaj hazardoj. Neniu rajtas do aserti, ke tiu voĉdonkampanjo estis tute senrezulta.

II. En januaro de 2010 *change.org* denove iniciatis voĉdonkampanjon, en kiu Renata Ventura aperigis la suban proponon: [http://www.change.org/ideas/view/obama\\_introduce\\_esperanto\\_as\\_a\\_foreign\\_subject\\_in\\_schools](http://www.change.org/ideas/view/obama_introduce_esperanto_as_a_foreign_subject_in_schools). Ni ĉiuj, kiuj partoprenis en la pasintjara voĉdono, bone sciis, ke Obama ne havas rajton enkonduki novan lernobjekton, ĉar ĝi estas ago-raĵto de la unuopaj ŝtatoj-membroj de Usono. Ni esperis, ke ĉi-foje la iniciato povas aperi inter la 10 plej ŝatataj ideoj, kaj ĝi aperos ankaŭ en la gazetaro kaj tiel pluaj milionoj da usonaj homoj informiĝos pri la ekzisto de Esperanto. Nia aktivula taĉmento sendis



alvokon pri la voĉdono al proksimume 4,000 esperantistoj vivantaj dise, en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. La 15an de marto 2009 *change.org* publikigis la rezulton. Kun 1333 voĉoj kaj 194 alparoloj la propono povis atingi la 30an lokon el inter 2,505 ideoj. Tiu ĉi rezulto estas multe pli malbona ol la pasintjara relativa sukceso. Ni ŝatus denombri kelkajn kaŭzojn de tiu ĉi (denove nur relativa) malsukceso. La politika entuziasmo kaj en Usono, kaj tutmonde regresis. La voĉdono en anglalingva retejo estis teknike sufiĉe komplika, ofte malsukcesa. Signifa parto de la esperantistaro ne volas amase disvastigi Esperanton. Pluraj kontraŭargumentoj aperis:

- Kial ni intermiksiĝu en internajn aferojn de Usono?
- Obama tucerte ne enkondukos Esperanton, do ni vane laboras.
- La angla lingvo jam venkis.
- Ni ne subtenu aferon, kiun UEA mem oficiale ne subtenas.
- La esperantistoj laciĝis je tiaj, senefikaj retaj kampanjoj.
- *change.org* mem estas sensignifa organizaĵo.
- Se iu foje aliĝas, poste ricevos anglalingvaj mesaĝojn de la organizaĵo *change.org*.
- Se ni ne povas kolekti sufiĉe grandan amason da subskriboj, niaj malamikoj konstatos, ke tutmonde vivas nur kelkcent-kelkmil esperantistoj.

III. Konkludoj: En la 21a jarcento nova epoko komenciĝis: La interreto ebligas tutmondan, tre rapidan kaj vastskalan opiniesprimon. Nia tasko estas eluzi tiun ĉi eblecon por Esperanto. Se ni ne prezentigas al la ekstera mondo, neniu rimarkos nin. Esperanto estas bonega varo, medio-protekta spirita produktaĵo, tamen ni devas ĝin reklami. Laŭ nia opinio ni devas kapti ĉiujn eblecojn por informi la homojn pri la internacia ponto-lingvo. Ni devas formi kunĉenaĵon de aktivuloj, kiuj zorgas pri la informado de siaj samlandanoj. Alivorte, ni devas dividi la taskojn. Informi nur samlandanojn (kaj kelkajn samideanojn en la najbaraj landoj) estas multe pli facile ol skribi plurcent mesaĝojn. Jam ekzistas diskutlisto por aktivuloj: *retaj-kampanjoj-por-esperanto@yahoogroups.com*. Sekvontfoje ni devas pli lerte kaj pli antaŭzorgeme organizi tiujn ĉi interretajn voĉdonkampanjojn.

Amike: Neil Blonstein, Novjorko ĉe UNO; Dario Rodriguez, Madrido; Leo De Cooman, Belgio; Fernando Maia Jr., Brazilo; d-rino Julianna Farkas, Hungario; d-ro Lajos Molnár, Hungario; Penelope Vos, Aŭstralio. ★

---

PS.: Ni ĵus (18a de marto, 2010) ekzamenis la interretajn ligilojn. Hodiaŭ ili ĉiuj bone funkcias. Povas okazi, ke la interreto disŝiros la longajn ligilojn. Ĉi-kaze bonvolu permane kopii en la serĉilon la mankantan, grizan parton.



# Unu tago en Kanbero

de Kam Lee

Mardon, la 1an de decembro 2009 kelkaj esperantistoj kaj mi vizitis du bone konatajn kanberajn lokojn, la Parlaŭmentejon kaj la Nacian Galerion. Poste ni vizitis la Nacian Portretan Galerion.

Parlaŭmentejo estis desegnita de Mitchell/Giurgola Architects, kaj konstruado komenciĝis en 1981. Malfermo de la konstruaĵo okazis la 9an de majo 1988, kaj dum ĝia konstruado ĝi estis la plej multekosta konstruaĵo en la suda hemisfero.

La konstruaĵo enhavas 300.000 m<sup>3</sup> da betono, kiu sufiĉas por 25 Operaj Domoj. La konstruaĵo enhavas 4.700 ĉambrojn kaj 2.416 horloĝojn, kiuj estas uzataj por informi politikistojn pri kunsidaj horoj. Dum nekunsida tago, 2.000 al 3.000 homoj laboras tie. Ni renkontiĝis antaŭo ĉi tiu impona konstruaĵo. Proksime estis kampadejo de protestantoj kaj okazis protesto rilate al plano por komerci pri forcejaj ellasaĵoj (angle: *greenhouse emissions trading scheme*).

La enirejo estis tre impona, kaj unue mi opiniis ke mi estas en ĉambrego de majesta antikva civilacio. La alta plafono estis subtenita per pilieroj faritaj el marmoro, kiu estas ankaŭ la materialo uzita en la farado de la ŝtuparoj kaj planko.

Ĉi tiun tagon estis planita nekunsida tago. Tamen, senatanoj ĉeestis pro la malrapida progreso de aferoj en la senata kunsido. En la Ĉambro de Reprezentantoj politikistoj ankaŭ ĉeestis pro la oficiala inaŭgurado de s-ro Abbott, kiu estis ĵus enpostenigita kiel estro de la opozicio. La antaŭa opozicia estro estis s-ro Turnbull kiu ekŝiĝis pro propono de nememfideco kaj perdo dum



*Starantaj antaŭ Parlaŭmenta Domo, maldekstre al dekstre estas Hazel Green, Paul Green kaj Kam Lee.*

*Standing in front of Parliament House, from left to right are Hazel Green, Paul Green and Kam Lee*



# Unu tago en Kanbero

by Kam Lee

On Tuesday 1 December 2009, several Esperantists and I visited several well-known Canberra locations, which are Parliament House and the National Gallery. Afterwards I visited the National Portrait Gallery.

Parliament house was designed by Mitchell/Giurgola Architects, and construction began during 1981. Opening of the building occurred on the 9th of May 1988 and during its construction, it was the most costly building in the southern hemisphere.

The construction contains 300,000 m<sup>3</sup> of cement, which is sufficient for 25 opera houses. The building contains 4,700 rooms and 2,416 clocks, which are used to inform politicians about session times. During the non-sitting days, 2,000 to 3,000 people work there. We met at the front of this imposing building. Nearby was a protest camp site and there was a protest in relation to the greenhouse emissions trading scheme.

The foyer was very imposing and first I thought I was in a giant room of a majestic ancient civilisation. The high ceiling was supported by pillars made of marble, which also was the material used in the making of the stairs and floor.

This day was a planned non-sitting day. However, senators were present due to the slow progress of affairs in the Senate meeting. The House of Representatives politicians were also present due to the official inauguration of Mr. Abbott, who was just appointed as the new leader of the opposition. The previous opposition leader was Mr. Turnbull, who was replaced due to a "no confidence" motion and a loss during a

*Sur la tegmento de Parliamenta Domo.  
Maldekstre al dekstre staras  
Sandra Connors, Hazel Green kaj Paul  
Green.*

*On the roof of Parliament House.  
Left to right are Sandra Connors, Hazel  
Green and Paul Green*





partia voĉdono. Bedaŭrinde, mi ne vidis la ĉefministron, s-ron Rudd, ĉar li estis eksterlande.

Ni iris al la tegmento de la konstruaĵo, ekde kie oni povas klare vidi la urbon Kanbero. Super ni estis la grandega flagstango, kiu havas kvar kruojn kaj flirtigis la aŭstralian flagon. Tempo por aŭstralianoj esti patriotaj, ĉu ne? La flagstango de Parlamentejo estas farita el korodimuna ŝtalo, estas 81 m alta, kaj pezas 220 tunojn. La flagego pezas proksimume 15 kg, kaj estas 12.8 m x 6.4 m, kiuj estas proksimume dunono de la areo de tenisejo.

Ni eniris en la kunsidan ĉambron de la senatanoj, kie okazis la revuo de modifoj de rezolucioj rilate al la plano por komerci pri forcejaj ellasaĵoj. La progreso de la akceptado de modifoj estis tre malrapida.

Dum voĉdonado de kelkaj el la modifoj, interesa momento okazis. Ĉiuj el la liberalaj politikistoj (proksimume 40?) ĉeestis, sed nur proksimume ses *Labour* politikistoj ĉeestis. Estis iomete strange, unu duono de la ĉambro estis plena de politikistoj kaj la alia duono

*Skulptaĵo ekster la Nacia Artgalerio: Konusoj faritaj el polurita korodimunua ŝtalo. Verkita de Bert Flugelman.*

*Sculpture outside the National Gallery: Cones, made from polished stainless steel. By Bert Flugelman.*






party vote. Unfortunately, I did not see the Prime Minister, Mr Rudd, because he was overseas.

We went to the roof of the building and one could clearly see the city of Canberra. Above us was the gigantic flagpole, which was supported on four large legs and flew the Australian flag. A time for an Australian to be patriotic, no? The Parliament House flag pole is made out of stainless steel, is 81 m high, and weighs 220 tonnes. The flag weighs about 15 kg, and has an area of 12.8 m by 6.4 m, which is approximately half the size of a tennis court.

We went inside the Senate chamber and there was a review of modifications of a resolution relating to the greenhouse emissions trading scheme. The progress of the accepting of the modifications was very slow.

During voting of some of the modifications, an interesting moment occurred. All of the Liberal politicians (about 40) attended, but only about six Labour senators were present. It



*Ĉe la antaŭo de la Nacia Artgalerio. La travidebla sfero estas subtenata en la aero per dratoj. La sfero, kiu nomiĝas Diamantoj, estas far de Neil Dawso, 2002.*

*At the front of the National Gallery. The transparent sphere is supported in the air by wires. The sphere is called Diamonds, was designed by Neil Dawson, 2002*



estis preskaŭ malplena. La propono de la *Labour* Partio ne estis akceptita, sed psikologia, strategia afero certe okazis, ĉu ne?!

La dua parto de la grupa ekskurso estis vizito al la Nacia Galerio. Konstruado de la Artgalerio komenciĝis dum 1973, kaj okazis la oficiala malfermo en 1982. La kosto estis 82 milionoj da dolaroj.

La Nacia Galerio havas la dudek- jarcentan "brutalisman" (angle: brutalist) stilon, kiun ĝenerale karakterizas okulfrapaj ripetadaj angulaspektaj formoj faritaj el betono, kaj krudaj betonaj surfacoj. Tre rimarkebla en la artgalerio estas la triangulaj ŝtuparoj, kolumnoj kaj konstruaĵaj elementoj.

Ni vidis la pentraĵojn *Bluaj Stangoj*, kiu estis pentrita de Jackson Pollock (1912-1956) en 1953. La aĉeto de la verko dum 1974 por 1,3 milionoj da dolaroj estis disputiga, sed nun ĝi estas ĝenerale konsiderata kiel inspirita akiro. Ni vidis la partojn de la pentraĵoj de Ned Kelly, pentritaj de Sidney Nolan (1917-1992). La pentraĵoj (1946-1947) esprimas tipan aŭstralian bildon kaj estas unu el al plej bonaj serioj de aŭstraliaj pentraĵoj dum la dudeka jarcento.

Interesaj estis la bildoj de la aŭstraliaj impresionistoj, Tom Roberts, Frederick McCubbin kaj Arthur Streeton. Impresionismo estas artmovado, kiu populariĝis dum la 19a jarcento kaj estis tre elstara dum la 1870aj kaj 1880aj jaroj.

Mallongaj peniktiroj kaj dikaj tavoloj de oleo-farbo estas uzataj por rapide kapti la esencon de la objekto, anstataŭ detaloj. Alia procedo estas metado de farbo flank-al-flanke kun minimuma miksado, kaj do la miksado de koloroj okazas en la okulo de la vidanto.

Ni piediris al la skulptaĵa parko ekster la konstruaĵo de la Nacia Artgalerio. Unu el la interesaj skulptaĵoj estas *Konusoj*, far de Bert Flugelman, kiu estas bone konata por lia geometriaj skulptaĵoj el korodimuna ŝtalo. *Konusoj* estas aro de sep paroj de duoblaj konusoj. Ĉiu paro de la konusoj estas ligita kune ĉe la bazo kaj ili estas aranĝitaj en rekta lineo. La pinto de unu paro estas ligita al la ekvatora parto de alia paro, kiu estas ligita al la pinto de alia paro kaj tiel plu.

Bert Flugelman ankaŭ estas konata pro la farado de aliaj skulptaĵoj kiel inter aliaj *Piramida Turo* en *Spring Street*, Sidnejo, kaj *Sferoj* en *Rundle Mall* en Adelajdo.

La Nacia Portreta Galerio de Aŭstralio enhavas aron de portretaj bildoj de eminentaj aŭstralianoj, kiuj gravas en iliaj kampoj de penado, aŭ kies vivo estas distingita kiel individuo laŭ long-perioda publika intereso.

En decembro 2008, okazis la malfermo de la permanenta konstruaĵo de la galerio. Ekzemploj de pentraĵoj de bone konataj aŭstralianoj estis Dame Nellie Melba (operkantistino), Princess Mary (reĝino de Danio), Don Bradman (kriketisto), Sidney Nolan (pentristo), Albert Namajira (pentristo), Rolf Harris (distristo), Michael Hutchence (muzikisto), Sidney Nolan (pentristo), kaj aliaj.

Konklude, la ekskurso estis sendube memorinda okazaĵo. Oni ne povas vidi ĉion de Kanbero en unu tago! ★



was strange that half of the chamber was full of politicians and the other half was almost empty. The proposal by the Labour Party was not accepted, but it was nevertheless important psychologically and strategically?

The second part of the group excursion was a visit to the National Gallery. Construction of the gallery began during 1973, and its official opening was in 1982. The cost was \$82 million.

The National Gallery is of the 20th century brutalist style, which generally is associated with eye-hitting, repetitive angular formations made out of cement and crude cement surfaces. Very noticeable in the Gallery were the triangular stairwells, columns and building elements. We saw the picture *Blue Poles*, which was painted by Jackson Pollack (1912 to 1956) in 1953. The purchase of the work during 1974 for \$1.3 million was controversial, but now it is generally considered as a visionary acquisition.

We saw part of the Ned Kelly series painting collection painted by Sidney Nolan (1917-1992). The paintings (1946-1947) express an iconic Australian picture and is one of the best series of Australian paintings during the 20th century. Interesting were the pictures by the Australian impressionists Tom Roberts, Frederick McCubbin and Arthur Street. Impressionism is an art movement, which occurred during the 19th century and was very prominent during the 1870s and 1880s.

The use of short brush strokes and thick layers of paint were used to rapidly capture the essence of the object more than the details. One technique is the putting of paint side by side with minimum mixing, and thus visual mixing of colours occurs in the eye of the viewer.

We walked to the sculpture park outside the National Art Gallery building. One of the interesting sculptures was called *Cones*, which is a work by Bert Flugelman, who was well known for his geometrical sculptures in stainless steel. *Cones* is a group of seven pairs of spherical cones. Each pair of the clones is connected at the base and they are arranged in a straight line. The points of each pair are connected to the equatorial part of another pair, which are connected to the point of another pair and so on.

He is known for other sculptures such as *Pyramidal Tower* in Spring Street, Sydney, and *Spheres* in the Rundle Mall, Adelaide.

The National Portrait Gallery of Australia is a collection of paintings and photographs of eminent Australians, who are important in their field of endeavor or whose life is distinguished as an individual during a long period of public interest.

In December 2008 the permanent building of the Gallery was opened. Examples of portraits of well known Australians are Dame Nellie Melba (opera singer), Princess Mary (princess of Denmark), Don Bradman (cricketer), Sidney Nolan (painter), Albert Namajira (painter), Rolf Harris (entertainer), Michael Hutchence (musician), Sidney Nolan (painter), and others.

In conclusion, the excursion was no doubt a memorable event. You cannot see all of Canberra in one day! ★



# Opaloj

de Jennifer Bishop

Ricevinte aprobon de la estraro de AEA provizi aŭstralian rokon laŭ peto de Esperanto-urbo, Herzberg en Germanujo, al ĉiu landa asocio, Jenny Bishop lastan jaron aĉetis rokon ĉe bazaro. Ŝi decidis aĉeti opalon. Ŝi kunportis ĝin al *ILEI*-konferenco por transdoni al Zsafia Korody, kiu veturis tien per aŭto.

Anglalingve oni diras ke opalo estas tipo de *mineroid gel*, kiu enhavas silikonon (aŭ dioksido de silico,  $\text{SiO}_2$ ) kaj akvon. La enhavo de akvo estas ĝenerale inter 3 ĝis 10%, sed povas esti tiel alta kiel 20%. La koloro de la opalo varias kaj povas esti klara, blanka, griza, ruĝa, oranĝa, flava, verda, blua, bruna, nigra aŭ de aliaj koloroj.

*Cooper Pedy* estas urbo en norda Sudaŭstralio, proksimume 850 km norde de Adelajdo. Proksimume 2.000 homoj loĝas tie, kaj pro la altega dumtaga varmeco la plejmulto el ili loĝas sub la tero en renovigitaj neuzitaj minejoj.

Pro la granda kvanto de opaloj kiuj estas minataj tie, la urbeto estas konata kiel la opala ĉefurbo de la mondo. Aŭstralio produktas 97% de la opaloj en la mondo.

La nomo *Cooper Pedy* venas el la loka indiĝena nomo *kupa-piti*, kiu signifas akvejeton de knaboj. ★

*Kelkaj anoj de la Melburna Esperanto-klubo kaj unu opala roko.*

*Starantaj: Maldekstre al dekstre estas Philip Smart, Alan Bishop, Richard Penman, Andrew Lutz,*

*Sidante: Carol Lutz, Jenny Bishop (tenanta la pecon de opalo) kaj Miranda Lutz.*  
*Foto de Kam Lee*



*Dudekcenda monero lokiĝas sur la maldekstra angulo de la roko. Tiel, oni povas kompari la grandecon de la opala roko.*

*Roko: 13 cm x 12 cm*

*Tavolo de solida opalo: 12 cm x 4 cm*



# Mia sperto kiel senlaborulo

de David Ryan

En novembro 2009, pro restrukturiĝo ĉe mia registara laboro, mi senlaboruliĝis. Oni ne plu volis tiom da ĉefoj kaj, tial, kelkaj el ni estis ĝentile forigitaj. Feliĉe, la novaĵo pri la restrukturiĝo ne estis subita. Ni ĉiuj sciis pri la ebleco ekde pluraj monatoj. Pro tio, mi ne estis tiom malgaja ĉar mi jam komencis plani eksterlandan ferion kaj pensis pri multaj farotaj taskoj en mia domo kaj ĝardeno dum (espereble) varma somero.

Tamen, mi neniam antaŭe dum mia kariero senlaboruliĝis kaj, tial, mi nun alfrontas strangan sperton.

La tagon post mia lasta tago ĉe laboro, mi ellitiĝis frue. Mi decidis ke mi certe ne volas resti la tutan tagon en mia lito aŭ hejme en piĝamo sen razi min ktp. Mi ne volis ploradi pri mia malbonŝanco aŭ permesi ke eta malagrabraĵo detruu mian vivon. Mi ne volis plendi pri mia senlaboreco, skribi plendan leteron al mia loka parlamentano, aŭ kritiki mian eksan laboron. Mi estis certa ke post nelonga tempo mi trovos novan postenon kaj, pro la fakto ke mi ricevis 'adiaŭan' sumon, mi ne devis maltrankviliĝi pri mia financa stato.

Tamen, resti hejme dum miaj amikoj kaj familianoj laboras estas nekomforte. Mi promenas laŭ la ĉefa strato de Velingtono en miaj neformalaj vestaĵoj kaj mi sentas ke ĉiuj kiuj preterpasas min en labora kompleto rigardas min kaj demandas kial mi ne laborante kontribuas al la ekonomio. Mi iras dum tago al naĝejo, butikoj ktp kaj mi sentas ke ĉiuj demandas kial mi ne estas en laborejo.

Kio plej mankas al mi, tio estas kontakto kun aliaj homoj. En mia eksa laboro miaj kunlaborantoj estis kiel miaj amikoj: 'Kion vi faris dum la semajnfino?' 'Ĉu vi povas rekomendi dentiston?' 'Ĉu plaĉis al vi la nova filmo de James Bond?' 'Ĉu vi volas lerni Esperanton?' ktp. Mi ankaŭ havis multan kontakton kun klientoj ktp per telefono, en kunvenoj ktp. Nun, tiuj 'amikoj' kaj oftaj kunbabilantoj subite malaperis. Certe, ni kelkfoje renkontiĝas por kafumi kaj iom babili, sed ne tiel ofte. Dum la plej granda parto de mia ĉehejma tago, mi estas sola aŭ nur mia edzino estas kun mi, aŭ mi parolas telefone nur por demandi pri laboranoncoj. Mankas pli vasta kontakto kun aliaj homoj.

Kiam mi hejmenflugis post la somera kursaro en Sidnejo, mi skribis en migra formularo: 'senlaborulo'. La migra oficisto demandis al mi 'Kion vi faris en Aŭstralio?' 'Mi ĉeestis kongreson de Esperanto' 'Ĉu la hispana?' 'Ne, Esperanto estas internacia lingvo' 'Kiu pagis vian flugbileton?' 'Mi mem' 'Kiel vi pagis se vi estas senlaborulo?' 'Ĉar oni senlaboruligis min kaj devis pagi sufiĉe grandan adiaŭan sumon'. Mi vere sentis min sen digno. Kial li rajtis fari tiajn demandojn al mi nur ĉar mi skribis 'senlaborulo'? Ĉu esti senlaborulo estas grava krimo?

Hieraŭ (en februaro kiam mi verkis ĉi tiun artikolon) oni anoncis ke senlaboreco en Nov-Zelando plialtiĝis al 7.3% (en Aŭstralio nur 5.5%): 168,000 nov-zelandanoj ne laboras. Kio plej gravas por mi nun, tio estas necerteco pri mia futuro. Kiam mi akiros novan postenon? Dum kiom da tempo mi restos senlaborulo? Intertempe, mi ne volas aĉeti novan aŭtomobilon aŭ eĉ elspezi monon en ne-necesaĵoj. Kio okazos se mia adiaŭa pago elĉerpiĝos kaj mi ankoraŭ ne havos novan postenon? Bonŝance, tamen, mi nun havas multan liberan tempon por verki artikolojn por Esperanto sub la Suda Kruco!



# Letero al ESK

17a de februaro, 2010

Dum la Universala Kongreso (UK) de Esperanto en Bjalistoko en 2009, kelkaj membroj ricevis diplomon, kiu agnoskis la 40 kaj 50 jarojn de ilia membreco.

Mi vidis la ricevantojn dum ili supreniris al la podio, manpremis kun gravuloj, kaj fine reiris al iliaj sidlokoj.

Hieraŭ mi komprenis.

Venis al mia leterkesto granda koverto, kaj el ĝi mi eltiris diplomon kun mia nomo, kiu dankis min pro mia fidela kaj seninterrompa membreco de pli ol 40 jaroj. En la letero, kiu venis kun ĝi, Osmo Buller esprimis sian esperon ke la prezidanto de UEA povos subskribi por mi alian diplomon por honori 50-jaran membrecon! Por tio, mi devas atendi nur 4 jarojn!

Mi eklernis Esperanton dum mi loĝis en Londono en 1962. Tuj post mia reveno al Sidnejo, mi aliĝis al la Sidneja Esperanto-Klubo. Post longa interŝanĝo de leteroj kun ĉino, kiu volis verki vortaron de samsonaj vortoj, mi verkis amuzan teatraĵon. Dum la unua UK en Brazilo, ĝi gajnis *apartan premion* (neniu gajnis la unuan, do fakte mi gajnis la trian). Tial, mia nomo aperis inter 20+ aliaj aŭstralianoj (kiel Trevor Streele, Ken Linton, Donald Broadribb) en libro titolita *Ordeno de la Verda Plumo*.

Refoje mi estas la sekretario de la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo, kaj redaktoro de *Telopeo*. De tempo al tempo mi estis prezidanto/kasisto/sekretario de la Sidneja Esperanto-Klubo, kaj en la periodoj kiam mankis libroservisto de AEA, mi deĵoris pri tio.

Mi ne povas longigi la vivperiodon de la membroj, sed mi esperas ke baldaŭ eksendiĝos diplomoj por pli el niaj sudhemisferaj esperantistoj.


Daŭre vivu kaj laboru!

Sincere (kaj, mi devas diri, fiere)

*Margaret Chaldecott*



# Nova libro kiu mencias Esperanton



En majo 2008 mi unuafoje legis pri Ursula Dubosarsky en libro pri aŭstraliaj verkistoj kaj ilustristoj por infanoj. Post legado de la paĝo pri Ursula mi serĉis pliajn informojn pri ŝi surrete kaj trovis ke ŝi studis en la Universitato de Sidnejo la malnovan islandan lingvon. Tio spronis mian atenton. Ŝi do interesiĝas pri nekutimaj lingvoj; ĉu eblus, ke ŝi ankaŭ interesiĝus pri Esperanto, mi demandis min. Mi decidis skribi al ŝi kaj sekvis interŝanĝo de pluraj mesaĝoj. Ŝi esprimis interesiĝon pri mia libro pri lingvoj kaj ŝi decidis aĉeti ekzempleron. Krome ŝi skribis, ke ŝi estas verkanta novan libron kaj intencas mencii Esperanton en ĝi. Ursula ankaŭ faris al mi demandojn pri la libroj de Claude Piron. Do mi scivolemis, ĉu vere ŝi mencias Esperanton en sia libro kaj kion precize ŝi skribos pri tiu temo. Dum la lastaj monotaj mi ne plu aŭdis de Ursula.

Pasintan ĵaŭdon Margaret diris al mi, ke alvenis pakaĵo por mi ĉe Esperanto-domo. Kiu sendas al mi pakaĵon, sed elektas ne sendi ĝin al mia persona adreso? Mi tre miris kaj tute ne pensis pri Ursula. Sed jen en la pakaĵo estis la libro *The return of the word spy*, la plej nova libro de Ursula Dubosarsky.

Do kiu estas Ursula? Ŝi naskiĝis en Sidnejo en 1961, edziniĝis kun argentinano kaj vivas en Sidnejo. En 1989 ŝia unua bildlibro por infanoj estis eldonita. Sekvis pli ol 20 libroj por infanoj, ne nur bildlibroj sed

ankaŭ pli longaj libroj kun ĉapitroj. En 2008 estis eldonita nefikcia libro *The word spy*, kiu en 2009 ricevis literaturan premion de la ĉefministro de Novsudkimrujo. Aliaj libroj de ŝi ricevis la saman premion en 2007, 2006, 1995 kaj 1994. Neniu alia verkisto ricevis la premion 5 foje!

Do kion ŝi skribas en la libro *The return of the word spy*, kies oficiala eldondato estas majo 2010? Enestas 5 paĝoj pri Esperanto. Ŝi skribas (kompreneble en la angla): "Mi certas ke vi jam aŭdis pri artefaritaj floroj, sed ĉu vi jam aŭdis pri artefarita lingvo?" Ŝi skribas iom pri Zamenhof kaj klarigas ke "[I]i ne celis ke personoj haltu paroli en siaj amataj propraj lingvoj. Li volis ke estu internacia dua lingvo kiun ni povus uzi por paroli kun iu ajn en la mondo". Ŝi listigas kelkajn Esperantajn vortojn kaj frazojn kun traduko, kiel *saluton, mi nomiĝas, dankon, kaj kie estas la necesejo*. Poste ŝi skribas en Esperanto "La rapida bruna hundo saltis super la maldiligenta vulpo" kaj provas instigi la legantojn diveni la signifon. Ŝi plu skribas en la angla: "Se vi deziras aŭdi kiel Esperanto sonas, ekzistas multaj retejoj kun filmetoj en kiuj vi povas aŭdi Esperanto-parolantojn". Je la fino de la 5 paĝoj ŝi klarigas tion kiun *ne krokodilu* signifas.

Evidente Ursula bone studis la temon kaj espereble ŝia libro estos sukcesa, kaj tio helpos multajn junulojn ekscii ion pri Esperanto. ★

de Nicole Else



Ursula Dubosarsky



# Nekrologo: s-ino Joyce Hill

## multjara aktivulo

Dum juneco Joyce loĝis en *Christchurch* sed je la fino de sia dekunua jaro de edukado la familio translokiĝis al *Velingtono*. La patro decidis ke Joyce ĉeestu komercan kolecion kaj lernu tajpadon kaj stenografion, kaj poste ŝi laboris en fako de la registaro. Joyce aliĝis Esperantan klubon kun celo trovi novajn geamikojn. Nelson Hill estis Prezidanto de la *Velingtona Esperanto-Klubo* kie li instruis Esperanton per la *Cseh-metodo*. Joyce fariĝis sekretario kaj de la *Velingtona Esperanto-Klubo* kaj de *NZEA*, kaj pro tio en 1948 ŝi ricevis honoran dumvivan membrecon de *NZEA*. Joyce korespondis kun Nelson dum li pilotis *Lancaster* bomb-aviadilon dum milito sur kiu estis verda stelo kaj la vorto *ESPERANTO*. Post kiam li hejmen venis li proponis geedziĝon al Joyce, kaj ili geedziĝis en oktobro 1947. Ili aĉetis domon en *Karori* kie ili ĝuis familian vivon kun kvar gefiloj. Nelson regule provizis novaĵerojn pri Esperanto al ĵurnaloj. Tial, la nomo Nelson Hill fariĝis kvazaŭ sinonimo de Esperanto en la cerboj de *Velingtonanoj*. En 1976 gesinjoroj Hill ĉeestis la *Universalan Kongreson* en *Ateno, Grekio*, kaj vizitis 12 landojn de kontinenta *Eŭropo*. Ĉie Esperantistoj bonvenigis ilin kaj faciligis vizitojn al vidindaĵoj, do ili sentis sin hejme en Esperantujo. Joyce estis tre religia kaj plej influita de la instruoj de ĉapitro 13 de *Korintanoj 2*. Tial, ŝi ĉiam strebis zorgi pri la bezonoj de familio, najbaroj, kaj membroj de la komunumo. Joyce reprezentis la *Metodistan eklezion* ĉe kunvenoj de *Nacia Konsilaro de Virinoj* kaj laboris por bonfaradoj grupoj. Ŝi estis membro de *UEA* kaj fakdelegito pri virinaj aferoj. Post la morto de Nelson en 1994 Joyce ankoraŭ ĉeestis lokajn kunvenojn kaj kongresojn. Pro grava malsano en 2006 Joyce perdis mallongan memorkapablon. Tamen ŝi neniam perdis sian kapablon paroli Esperanton kompetente. Joyce forpasis pace, dum dormo la 13an de marto. Laŭ invito de la Hill familio, David Ryan, *NZEA* Prezidanto, simpatie parolis pri Joyce kaj ŝia Esperanto agado dum la funebra ceremonio ĉe la preĝejo *St. Ninian* en *Karori*, la 26an de marto. ★

de Gwenda Sutton

Joyce staras en  
antaŭa vico portanta  
buntan vestaĵon. Foto  
de Jo Horton.







## **New Zealand Esperanto Association**

P.O. Box 8140  
Symonds Street  
Auckland 1035  
New Zealand

**www.esperanto.org.nz**  
nzea@esperanto.org.nz  
0800 350 781

David Ryan | President  
*ryangomez@xtra.co.nz*

Chris Krägeloh | Vice-President  
*esk2@esperanto.org.au*

Donald Rogers | Treasurer  
*dero2648@clear.co.nz*

Bradley McDonald | Secretary  
*bradley.m@whoosh.co.nz*

Howard Gravatt | Assistant Secretary  
*hgravatt@ihug.co.nz*

Erin McGifford | Committee Member  
*Erin.mcgifford@press.co.nz*

*NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.*

*NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.*



## **Australian Esperanto Association**

P.O. Box 339  
Pascoe Vale South  
Vic 3044  
Australia

**www.esperanto.org.au**  
info@esperanto.org.au  
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President  
*prezidanto@esperanto.org.au*

Kam Lee | Administrative Director  
*admin@esperanto.org.au*

Stephen Pitney | Financial Director  
*financoj@esperanto.org.au*

Miranda Lutz | Dir. of Member Services  
*servoj@esperanto.org.au*

Vacant | Dir. of Promotion  
*informado@esperanto.org.au*

Jennifer Bishop | Director of Education  
*edukado@esperanto.org.au*

Yaw Ampomah Badu | Dir. of  
Implementation  
*utiligado@esperanto.org.au*

*AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.*

*AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.*





# FEED YOUR BRAIN ESPERANTO

Esperanto is a fascinating language. Some learn it for travelling, others for corresponding with penpals, or chatting to people from all over the world over the internet.

Others learn it just to exercise their brain.

**BRAINFOOD**

[WWW.ESPERANTO.ORG.AU](http://WWW.ESPERANTO.ORG.AU) • [WWW.ESPERANTO.ORG.NZ](http://WWW.ESPERANTO.ORG.NZ)

Due to its easy grammar and clever word formation system, you can learn Esperanto faster than any other language.